

GRUPO ESPERANTISTA
VERDA STELO
DE BOULOGNE-SUR-MER

Boulogne-sur-Mer
la 22^{an} de Aug. 1922

Sekretariejo:
~~82, Strato de Bréquerette, 82~~
BOULOGNE-SUR-MER
FRANCUJO

TELEFONO 0.68

Kara korespodanto.
Dankon multan por P.K. via de Praha.

Sed, vi ne parolas pri letero mia de la 31^a de Julio kiun mi sendis al vi kun 5 fotografaĵetoj. Ho! Diru al mi ke vi bone ricevis ĝin. Mi skribis (samtempe vi faris same) rakontante, kvazaŭ estis nune, la Prahon kongreson kun detaloj.

Mi multege bedaŭros se ĝi perdiĝis. Mi neniam plu povus skribi same. Fotoj, estas nenio! Facile mi povus havi aliajn.

Pri via kongresa letero de la 28^a mi korege dankas vin. Mi havis la saman ideon, vi vidas. Sed tio estis natura.

2

La sama dato revenis + ĉiuj kongresanoj pripensis al la belaj Prahaj tagoj, ĉu ne?

Malfeliĉe ne estos same por Helsinki!!! Mi ricevis P.Kjn de S^{ro} Legrand, de S^{ro} Deligius, de D^{ro} Arnhold, de S^{ino} Zamehof. Tre afablaj ili estis, dirante, kiel ili bedaŭris mian neĉeeston. Ŝajnis bela, tre bone organizita Kongreso + tute historia ĝi estos pri la uniĝo de l' U.E.A. + de la Centra Oficejo!!!

Mi tralegis de nove vian ŝatindan leteron! Kiel ĝi plaĉas al mi. Mi ne bezonis ĝin por rememorigi la Kongreson, (vi vidis tion per mia propra letero kiu donis tiom da detaloj + ankoraŭ ne ĉiuj tiuj kiuj estas en mia memoro + aliaj kiuj ne koncernas vin). Sed, tamen mi ĝojis legante ĝin, vidante ke kongreso ĉe vi ne estas forgesinda.

Karlštejn !!! Kiom da memoroj tiu nomo alvokas! Unue, la teatraĵo kie mi preskaŭ dormis, + morgaŭe la ekskurso

3

kun mia edzo. Apud tiu kastelo en restoracio sub arboj, mia edzo verkis belan poezion por mi kiun mi ankoraŭ havas.

Denove mi renkontas personojn kiuj deziras lerni Esp. De post la idiotika cirkulero de nia Ministro, "tant il est vrai que tout Français aime le fruit défendu". Multaj artikoloj aperas en gazetoj nun pri Esp. + kontraŭ la cirkulero. Do, vi vidas "à quelque chose malheur est bon".

Post kelkaj tagoj (la 2^{an} Sept) ni vizitos Alsacon, la altan Alsacon, sur la montoj. Ni iros rekte de Boulogne al Mulhouse en 13 horoj. Sed skribu tamen – oni sendos ĉiujn leterojn al mi. Sed mi pli ŝatus ke vi skribu antaŭ la 2^a.

Grandegan dankon por traduko + elspezo de ĉekaj kronoj kiujn mi ne posedas. Mi ne petis tion al vi ĉar mi ne volis ĝeni vin. Ĉu vi bonvolus enmeti leterkoverton adresitan al vi kun P.Marko gluita sur ĝi? Por la respondo ebla. Kiel mi dankas vin.

Mi pensis, ke sendante leteron al la anstataŭanta pastro en tiu vilaĝo, eble vi havos respondon. Sed nature mi ne konas la nomon. Sro Stefan Varzaly skribis al mi antaŭ la milito + post la milito. Mi multe laboris por li en ŝipaj agentejoj por havi lokojn, pasportojn, k.t.p. Antaŭ ol enŝipiĝi, en Francujo el Cherbourg, li skribis belan leteron al mi, sendante portretojn de sia familio + dirante ke li certe trovos manieron por rekompensi min. Poste, mi supozas ke li foriris al Ameriko + ... nenion plu de li. Ĉu li mortis? Ĉu estas "Tout passe. k.t.p."

4

vidu la aldonajon

5

Kio ajn estas, mi ŝatus se estus eble, koni la veron. Do, kara amiko, dankon, grandan dankon.

Dankon ankaŭ por la vidaĵo el Praha. Mi rekonis la monumenton apud kiu oni ripozis.

Mi ĝojas ke Eva nun tute estas sana, + ke ŝi iris al la kamparo, vi ankaŭ + via edzino. Oni bezonas libertempon, eĉ kiam oni vivas trankvilan vivon, ne febran, kiel vi certe vivas en via

6

malgranda urbeto.

Ankoraŭ hodiaŭ estas vintra vetero. Hieraŭ + antaŭhieraŭ estis someraj tagoj. Ni sidis je la bordo de la maro admirante la banantojn + ĉefe la banantinojn kiuj havis belajn kostumojn.

Kelkaj centoj estis en la maro + ĝoje kriis + amuziĝis.

Mi sidis posttagmeze en mia ĝardeno sur la herbejo, meze de floroj, + mi laboris tie. Mi multe ŝatas labori je la ĝardenaj aferoj. Mi estus ŝatinta esti ĝardenisto tre instruita!!! Sed tio difektigas multe manojn + oni devas poste pasigi 1/4 da horo por purigi ilin k.t.p.

7

Nun, mi forlasos vin de nove esperante ke vi baldaŭ sciigos min ĉu vi ricevis mian lastan leteron + fotojn. De nove dankon por ĉio. Tut'koran saluton al via Edzino, kareson al Eva.

En Mulhouse ni vizitos Esperantistojn kies unu estas la frato de la edzino de mia malnova (4 jaroj) korespondanto en Meksikujo. Li edziĝis lastan Sept. Per prokuro + ŝi iris al Meksikujo estante edziniĝinta. Li estis iom seniluziigita. Li nur vidis ŝin antaŭ 10 jaroj.

Amikajn sentojn.

Acie Sergeant

Se vi opinias ke estus pli bone adresi la leteron al la urbdomestro de Sĉavnik, faru. Sed eble tiu vilaĝo ne havas urbestron.

Grandegan dankon.

Ĉu P.M. frankoj povus esti utilaj al vi?

Aldonaĵo

GRUPO ESPERANTISTA
VERDA STELO
DE BOULOGNE-SUR-MER

Sekretariejo:
~~82, Strato de Bréquerecque, 82~~
BOULOGNE-SUR-MER
FRANCUJO

TELEFONO 0.68

Por esti tradukita + sendita al:

S^{ro} Pastro de Preĝejo Ortodoksa
Župa Sarišska Sčavnik
poštejo Giraltovec
Tcheco-Slovaquie

Estimata S^{ro}.

Ĉu vi estus afabla + bonvolus sendi al mi, se vi konas ĝin la adreson de Pastro Stefan Varzaly kiu forlasis vian urbon por iri Amerikon 1921.

Estas por amiko mia en Franclando al kiu li ofte skribis. De post lia enŝipiĝo en Cherbourg (Francujo) mia amiko nenion plu ricevis de li + li ŝatus scii kie li estas + kiel li fartas.

Mi esperas ke mi ne ĝenos vin + petas vian senkulpigon.

Antaŭdankante vin + salutante

(subskribita) J.Fousek